

Martin Fierro

Claude Gacond, 161-a radioprelego, 1966.11.09 & 1966.11.12

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtundan Radiostacion. Hodiaŭ parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la kvina volumo de la *Serio Oriento-Okcidento* eldonita sur la aŭspicio de UEA en kulturaj rilatoj kun Unesko.

Kun granda intereso mi ĵus legis la argentinan eposon **Martin Fierro** de **José Hernandez** dank'al la esperantigo de **Ernesto Sonnenfeld**.

A.- Kiam mi trafolumis tiun belan libron kun desegnaĵoj pri la vivo de la gaŭĉoj, tiam mi konstatis, ke ĝi estas verse verkita.

Cl.- Kaj pro tio vi kontentiĝis rigardi nur la bildojn. Ankaŭ kiel vi mi unue rezignis entrepreni la legadon de tiu poemego. Malagrablajn eksperimentojn mi jam faris kun similaj poeziaj verkoj.

A.- Ha, ankaŭ vi foje, provante legi poemon, havis la impreson devi traduki el poezia ĵargono en normalan lingvon, por kompreni ion el tiu vorto-vico.

Cl.- Mi ĉiam pli dubas pri la arta valoro de poeto, kies lingvo ne estas komprenebla sen inicio. Sed tuj sciu, ke en la rakonto pri *Martin Fierro*, la versoj, anstataŭ rompi la legon, ĝin kontraŭe agrabligas per ritmo, kiu nin transportas en atmosferon de popolaj kantoj kaj legendaj aventuroj. Jen legu la unuan strofon :

A.- Ĉi tie do mi ekkantas
laŭ ritma sono gitara,
ĉar kiun neordinara
sufer' afliktas, simile
al bird' soleca, laŭtrile
konsolas lin kanto klara.

Cl.- Tiu poemego *Martin Fierro* diskoniĝis tuj fulmrapide tra la pampo. En sep jaroj la nombro de eldonoj atingis jam 11 kaj de ekzempleroj 40'000. Ĝi fariĝis kvazaŭ artiklo de ĉefa vivbezono. « *Oni aĉetis trinkaĵon, panon kaj unu Martin Fierro* » diras sprite **Julio Mafud** en la antaŭparolo. Kaj li daŭrigas :

A.-« *Kiuj sciis legi, komentis kaj recitis ĝin al la analfabetoj. Ekzistis kantantoj, kiuj parkeris la poemon. La tono de protesto kaj voko de justeco por la subpremitoj donis al ĝi nivelon profunde humanan. Martin Fierro certmaniere iniciatas la tutan literaturon de socia protesto ĉiflanke de Ameriko. Tamen pri la plendo grava, balbutanta kaj ribela de l' subpremito kaj de l' ekspluatato, petantan justecon, ne nur cele al sociaj atingoj, sed ankaŭ por la vivado mem.* »

Cl.- Aŭdu tiun desegnon de la gaŭĉa sorto :

« *La gaŭĉo-vagabondo
vivas nur en fremda rondo
kaj post ĉiu akcidento
ploras li en nova mondo.*

A.- Ĉifonita, postsekvata,
ĉiam estas li en fuĝo,
sen ŝirmejo, sen rifuĝo
kvazaŭ ĝis etern' damnito,
esti gaŭĉo - ... Dia juĝo! –
ŝajnas tio jam delikto.

Martin Fierro

Claude Gacond, 161-a radioprelego, 1966.11.09 & 1966.11.12

Cl.- *En la dezert' li rifuĝas,
loĝejon en herboj havas.
Se li pro malsat' verdflavas
kaj lazon por ĉaso uzas,
lin oni leĝe akuzas :
laŭ diro li ŝtelorabas.*

A.- *Kaj se oni lin kuŝigas,
sur dorso en krega stato,
ne estas por li kompato,
sed kiel sovaĝa besto
ĵetiĝas al tru' korp-resto
sen fina vort', nek preĝado.*

Cl.- La aŭtoro de tiuj versoj, **José Hernandez**, naskiĝis en la provinco **Buenos Aires** en 1834. Lia infana vivo estis pure kamparana. Tiam li jam familiiĝis kun la vivo de la gaŭĉoj kaj indianoj. Poste, kiel brut-bredisto en regiono lima inter la civilizo kaj indiana mondo li pli intimiĝis kun la problemoj, ĝojoj kaj malfeliĉoj de la persekutataj gaŭĉoj. La poemaro *Martin Fierro* estos akuzo kontraŭ la mortigo de tuta popolo. En ĝi José Hernandez atakas la aŭtoritatojn kaj registaron kaj ties reprezentantojn, kiuj estas la kaŭzantoj de la morto fizika kaj socia de la gaŭĉo. Ili faris la gaŭĉon kontraŭleĝulo por povi lin persekuti kaj sisteme elimini. Kiam iu gaŭĉo estas arestita, tiam la juĝisto uzurpas lian havaĵon kaj detruigas lian kabanon. La kaptitaj gaŭĉoj estas senditaj en kazernojn por morti en mizero kaj sklaveco.

A.- Ni tuŝas tie la universalan aspekton de la verko de **José Hernandez**. *Martin Fierro* estis gaŭĉo, sed sub aliaj klimatoj, en aliaj kontinentoj multaj aliaj *Martin Fierro* estis kaj daŭre estas proklamitaj eksterleĝaj por povi esti eliminataj helpe de leĝoj.

Cl.- Jes. Legante *Martin Fierro* ni konatiĝas kun la suferoj de la gaŭĉoj, sed ni ankaŭ pensas al tiuj de la judoj, de la armenoj, de la kataroj, de la ribelantaj popoloj kontraŭ la koloni-okupantoj, de la minoritatoj en multaj landoj.

A.- Ni tiam komprenas, kial tiu verko fariĝis artiklo de ĉefa vivbezono por la persekutataj gaŭĉoj. Nun sub esperanta vesto, dank'al la mirinda traduko de **Ernesto Sonnenfeld**, tiu defendo de la persekutatoj estas aŭdata en la tuta mondo.

Cl.- Strofon kiel tiu ĉi oni povus skribi sub multaj fotoj venantaj el la landoj, kie hodiaŭ malsato regas :

*Mi kreskis, kiel dirite,
sen vestoj, foje sen manĝo.
Mi gajnis por vivaranĝo.
La jaroj tiel forpasis –
jam viro mi, nur okazis
en spec' de turmentoj ŝanĝo.*

A.- *Bonvolu ĉiuj memori
pri jenaj vortoj de vero :
en la lernejoj de sufero
mi havis mian lekcion
kaj studis mi tie ĉion
ek de l' plej frua espero.*

Martin Fierro

Claude Gacond, 161-a radioprelego, 1966.11.09 & 1966.11.12

Cl.- Alia strofo gravuriĝis en mia cerbo. Jen mi legas ĝin por konkludi :

*Vi memoros : ni ne havis
lokon, kie korpon gardi,
kie fajro povus ardi,
nek angulon, kie esti,
nek ĉemizon por nin vesti,
nek eĉ ponĉon por ekvarmi.*

A.- Jen trista sorto inda je ribelemo.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-